John Ellerton,

# The day Thou gavest, Lord, is ended

1. The day Thou gavest, Lord, is ended,
The darkness falls at Thy behest;
To Thee our morning hymns ascended,
Thy praise shall sanctify our rest.

2. We thank Thee that Thy church, unsleeping,
While earth rolls onward into light,
Through all the world her watch is keeping,
And rests not now by day or night.

3. As o'er each continent and island
The dawn leads on another day,
The voice of prayer is never silent,
Nor dies the strain of praise away.

4. The sun that bids us rest is waking
Our brethren 'neath the western sky,
And hour by hour fresh lips are making
Thy wondrous doings heard on high.

. . .

John Ellerton,

# Ni estis ja en mano Dia

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Ni estis ja en mano Dia,
dum brilis super ni la Sun'.
Protektu nin per mano Via
dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la veno
de l' nova tag', ripozas ni
dum tiu nokt' en Via beno[2]
ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' fordronas
la Sun' en tiu ĉi vesper',
multvoĉe Via laŭdo sonas
alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta
la Teron lumo de l' maten',
senĉese estas plusonanta
preĝado de la homoj jen.

. . .

John Ellerton,

# Finiĝas nun alia tago

*tradukita de William John Downes*

1. Finiĝas nun alia tago,
jam venis la vespera hor'.
Kunvenis ni por adorago
plaĉanta al la Di-Sinjor'

2. Ni dankas Vin, Savanto nia,
ke sur la tuta mond-teren'
la sankta eklezio Via
staradas firme ĉe posten'.

3. Ruliĝas tero, brilas lumo
de ne-ĉesanta maten-glor'.
Leviĝas laŭdo, preĝ-parfumo
konstante, kiel dolĉ-odor'.

4. Ekdormas ni post sun-subiro;
gefratoj en la okcident'
vekiĝas kun novtag-aspiro
Vin glori per viv-elokvent'.

. . .

John Ellerton,

# Forpasis tiu tag', Sinjoro

*tradukita de Frieder Weigold*

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,
Kaj profundiĝas la senlum'.
Vi gardis nin de ajn doloro.
Nin gardu ankaŭ dum noktum'!

2. Ni rotacias en la tagon.
En nokta paco dormas ni.
Kaj portas lumon trans la maro
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno
Briladas super tera rond',
Eksonas laŭdo pro la beno
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,
Ja brilas en plu fora land'!
La gloron, kiun ni admiris,
Anoncas plu preĝada kant'.

. . .

[2] aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

http://www.poezio.net/version?poem-id=130&version-id=255,257,302,932

5. So be it, Lord; Thy throne shall never,
Like earth's proud empires, pass away:
Thy kingdom stands, and grows forever,
Till all Thy creatures own Thy sway.

...

5. Ja estas, Dio ĉiopova,
senlima Via regno, nin
konduku al la tago nova
en Via regno je la fin'!

...

5. Formortos mondaj imperioj,
sed Via regno kreskos plu.
Al Vi sin cedos dinastioj,
Venkinto estos vi, Jesu'!

...

5. Pereas regnoj. Tiel estu!
Kaj sole staras via tron',
Ke sole via regno restu
Je fina tag' sub unu kron'.

...

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* John Ellerton *(∗1826-12-16 – †1893-06-15), publikigita 1870.*

*Arg-130-255 (2008-11-08 14:47:39)*

*Information about the author can be found on the website* `http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton_j.htm`*.*

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de* John Ellerton *(∗1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2004-01-10.*

*Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)*

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de* John Ellerton *(∗1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de* William John Downes *(∗1892 – †1987).*

*Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)*

*Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro "Adoru", eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.*

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de* John Ellerton *(∗1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo* `http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf`*.*